# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 191 DECEMBRO 1996**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista )
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO.

*** Sankta **PIO X**-a, preĝu por ni. ***



## Sommaire/*Enhavo*


Pages/*Paĝoj*

Le mot du président - *La bileto de la prezidanto* 3
Prière - *Preĝo* 5
Sainte Thèrese de Lisieux
*Sankta Tereza de Lisieux* 6
A travers le monde - *Tra la mondo* 8
*Protokolo de la komitatkunveno de la 16/10/96* 9
*Kongreso en La Houssaye en Brie* 10
Thème du Congrès - *Temo de la kongreso* 12
Paix sur votre maison - *Paco sur via domo !* 14
Taizé - *Taizé Europa Renkontiĝo* 15
Dans notre association - *En nia asocio* 16
Boite aux lettres - *Leterkesto* 17
Calendrier - *Kalendaro* 19
Anecdotes -*Anekdotoj* 20
Annonces - *Anoncoj* 21
Menu de Noël - *Kristnaska menuo .* 22
Abonnements - *Kotiztabelo* 23


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: *Sendinto* PRIEURE SAINT-MARTIN
77 610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE


**Motif de non distribution**


- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé
**PORT PAYE**
La Houssaye en Brie (77)

77-LA HOUSSAYE-EN-BRIE * P.P. * 19-12 1996 *

## Surkovrile

Tereza de l'Infano Jesuo el Lisieux,la plej grava sanktulino de la modernaj tempoj.
Sur la bildo ŝi estas 16-jaraĝa. (Vidu p. 6-7)



L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 5.a de februaro,majo,aŭgusto kaj novembro.

Finpresado la 29/11/1996


*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 191 Decembro 1996**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen



Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue du Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES

Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com




# Le Mot du Président

L'année 1996 aura vu de grands changements dans notre association,avec l'arrivée d'une nouvelle secrétaire et l'apparition d'un bulletin renouvelé dans sa forme,sa présentation et son contenu. Tout cela est le signe que la sève espérantiste coule dans les veines de notre association qui s'éfforce de s'adapter à sa mission.

L'année 1997 sera riche d'événements pour nous. Notre congrès de La Houssaye en Brie sera l'occasion de nous retrouver nombreux autour d'un programme alléchant,quelques jours après la rencontre européenne de Stuttgart.

Cette année sera aussi celle du congrès international d'IKUE qui se tiendra en Italie et nous rassemblera autour de nos amis étrangers,sans que la barrière de la langue soit un obstacle à nos échanges de vue.

Mais 1997 devra en outre être une année de travail car nous aurons à préparer le congrès oecuménique de 1998 qui réunira à Nantes catholiques et protestants et servira d'ouverture au grand congrès mondial de Montpellier,qui le suivra immédiatement.

C'est dire que nous aurons besoin de tous nos membres pour mettre en place tous ces rassemblements espérantistes qui,ainsi qu'il convient de le souligner,se tiendront en France. Quand on pense que le dernier congrès universel dans notre pays fut celui de Marseille en 1957,nous ne pouvons que nous réjouir de ce que nous prépare l'avenir.

En avant donc ! Que 1997 soit pour vous tous une année d'action,de joie et de grâce divine .

# La Bileto de la Prezidanto

Gravaj ŝanĝoj okazis en nia asocio dum la jaro 1996; enoficiĝis nova sekretariino kaj aperis renovigita bulteno en la formo,la prezento kaj la enhavo; ĉio estas signo,ke la esperantista suko fluas en la vejnoj de nia asocio,kiu klopodas adaptiĝi je sia misio.

La jaro 1997 estos riĉa de okazaĵoj por ni. Nia kongreso en La Houssaye en Brie estos okazo por renkontiĝi ĉirkaù alloga programo,kelkajn tagojn post la Eùropa renkontiĝo en Stuttgart.

Tiu jaro estos ankaù tiu de la internacia kongreso de IKUE, kiu okazos en Italio kaj kunigos nin kun niaj eksterlandaj amikoj sen,ke la lingva barilo estu obstaklo al niaj vidpunktaj interŝanĝoj.

Sed 1997 devige estos ankaù laborjaro,ĉar ni estos preparontaj la ekumenan kongreson de 1998,kiu kunvenigos en Nantes katolikojn kaj protestantojn; ĝi estos same malfermo al la grava universala kongreso en Montpellier,kiu tuj sekvos ĝin.

Tio signifas,ke ni bezonos ĉiujn niajn membrojn por instali tiujn esperantajn kunvenojn,kiuj,kiel konvenas substreki,okazos en Francio. Kiam oni pensas,ke la lasta universala kongreso en nia lando estis tiu en Marsejlo en 1957,ni povas ĝoji pri la estontaj aranĝoj.

Antaùen do ! 1997 estu por vi ĉiuj jaro de agado,ĝojo kaj digraco.



# La Vivo


Vivo estas ŝanco,ekprenu ĝin.
Vivo estas devo, faru ĝin.
Vivo estas riĉaĵo, konservu ĝin.

Vivo estas mistero, malkovru ĝin.
Vivo estas promeso,plenumu ĝin.
Vivo estas himno, kantu ĝin.

Vivo estas batalo, akceptu ĝin.
Vivo estas feliĉo, meritu ĝin.
Vivo estas vivo, defendu ĝin.

Laù Patrino Tereza el Kalkuto .
(esperantigis A.B)

**La Kristnaska Arbo**



La unua Kristnaska arbo estis sendube starigita en Strasburgo en 1539. La ĉiama verdkolora arbo estas popola simbolo de la arbo de la vivo,plantita en paradizo.

La steloj: simboloj de la Stelo de Bethléem kiu gvidas la paŝtistojn kaj la magojn.

La buloj: simboloj de la Tero,tiu universo, kie la Infano de la kripo estas reĝo.

La kandeloj: rememorigas pri tiuj paroloj de Jesuo Kristo : << Mi estas la lumo de la mondo >>

# Sankta Tereza de Lisieux

*La 29.an de septembro estis malfermita la Jaro de la Jarcento de la morto de la "malgranda Tereza" (30-9-1897). En sia sanktejo de Lisieux, "la plej grava sanktulino de la modernaj tempoj" (Pio X), atendas du milionojn de pilgrimantoj el la tuta mondo.*

Kiu estis Tereza de Lisieux aù Tereza de l'Infano Jesuo ?
Terèse Martin, naskiĝis en Alençon la 2.an de januaro 1873.Ŝi eniris la Karmelon[1] de Lisieux kiam ŝi estis 15-jara.Neniu aùdos pri ŝi ĝis sia morto naù jarojn poste la 30.an de septembro 1897. En murmuro , kiu estas biografia resumo: "Mi ne pentas pri mia livero al la Amo ... Mia Dio ... Mi amas Vin ! " Dum sia agonio, la tuberkuloza junulino promesis "pluvo da rozoj sur la tero", sed ŝi estis entombigita sen floroj kaj sen kronoj, kaj ĉeestis 30 personoj. Ŝia spirita patro bruligis ŝiajn okdek leterojn, kaj ŝia superulino, ŝia fratino, ne sciis,kion skribi por la nekrologa anonco. Tuj poste ŝi eldonis la manuskriptojn, skribitajn laù la ordo de Tereza, kaj sin demandis kiel vendi la 2000 specimenojn ? Post kelkaj semajnoj, tiu "Historio de unu animo " estis elĉerpita !
Ĝi estis tradukita en 60 lingvojn kaj dialektojn.
Tereza estis kanonizita en 1925. La Papo Pio X.a diris :
"Tereza de l'Infano Jesuo estas la plej granda sanktulino de la modernaj tempoj". Kial ? Ŝi estis eta burĝino de la fino de la XIX.a jc. Ĉie en la mondo, oni celebros la Jarcenton de ŝia morto. De Edith Piaf ĝis la kvin lastaj papoj, ŝi fascinis milionojn da spiritoj. Ŝi certe estas la plej respektata francino en la mondo.



Oni trovas ŝian rideton, ŝian statuon kaj ŝiajn rozojn de Ghardaïa ĝis Nouméa, de Tokio ĝis Beyrut,de Oslo ĝis Auraxgabad,de la golfo de Hudson ĝis la Insulo Reunio. Ŝi estis samepoka kiel Rimbaud, Marx, Van Gogh, Dostoïevski, Freud, Nietzche, Wagner kaj Zamenhof[2]. Ŝi neniam ĉesis,ŝi ne finis movi homamasojn kaj mirigi nin sub banala aspekto. Ŝi egalas la ĉi-suprajn geniojn kaj respondas laù sia maniero al la samaj demandoj : "Kial la libereco ?" Ĉu ni devas timi la estontecon,kaj se Dio ne ekzistus ? Kial suferi se oni amas kaj kiel ami ?

[1] Karmelo: Unu el la kvar almozpetantaj ordenoj,fondita en la 12-a jc. Monaĥejo,kie vivas anoj de tiu ordeno.

[2] Zamenhof : Kiam ŝi eniris la Karmelon, tiam Zamenhof eldonis sian unuan verkon "Dr Esperanto " kaj naskiĝis nia lingvo !

ALIA SAMEPOKA FRATINO .
" FLORI en la DOLORO " :



Fratino Serafina de la Anĝeloj (Vittoria Gisella Gregoris) naskiĝis la 15.an de oktobro 1873 en Fiume Veneto (PN) Italio. Ŝi eniris la monaĥinejon de la Franceskanoj de Venecio kiam ŝi estis 21-jara. Tri jarojn poste ŝi malsaniĝis pro nekuracebla malsano kaj estis en lito dum 38 jaroj, ĝis sia morto la 30/1/1935. Ŝi transformis la doloron en pli grandan amon :" tio estas la parabolo de fratino Serafina.
(Laù libro pri ŝia biografio - 1985 )

## TRA LA MONDO

Brazilo : La nova urbestro de Sao Miguel do Passa (GOIAS) estas fratino Celia (Misiistino de Sankto-Aùgusto) .La urbo enhavas 6000 loĝantojn.

Kazakstano: La unua kristana elementa lernejo malfermiĝis en la vilaĝo de Kornneuka .Ĝi estis fondita de la germana pastro Mgr Lorentz .

Germanio: Juna Belga Benediktano estis premiata al la Monda Forumo de Video en Koln pere de la Internacia Katolika Organizo pri Kino kaj Audovidaj Medioj. (OCIC). Fakte li unuafoje faris aventuran interaktivan ludon pri religia temo sur CD-ROM.La ludo estas "La pilgrima trejnisto ". Per tiu komputila ludo oni povas travivi en ĉiuj siaj detaloj la aventurojn de la pilgrimo al Compostelle.

## AŬSKULTU VATIKANAN RADION

Elsendoj en Esperanto :

DIMANĈE - Horo 21.20 laù mezeùropa tempo (10')

Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005(74.90 m),5880 (51.0m)

Satelite : Eutelsat II-F1,13 East,10.987 GHz,transponder 25,
Video NBC Superchannel,subportanto 7.39 MHz
FM,Panda 1,vertikala polarizado.

MERKREDE : Horo 21.20 laù mezeùropa tempo (14')

Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 6185(48.50m),7365(40.73m)

**Kaj skribu al : Radio-Vatikana - Esperanto Redakcio**
**SCV-00120 CITTA del VATIKANO**

Ankaù **POLA RADIO** ofte parolas pri Katolikaj temoj en Esperanto : Elsendoj ĉiu-tage !

15h30 31,50m;41,18m;41,99m;50,00m(=9525,7285,7145,6000kHz)
22h30 41,27m;49,71m;49,22m (=7270,6035,6095 kHz)
Per satelito: Eutelsat II F-3-16 gr. orienta lat., 11.080 GHz H
Subportanto 7,38 MHz . Ĉiutage : 06h30 - 15h30 kaj 20h00
Pola Radio-Esperanto Redakcio PF 46 PL-00977 VARSOVIO



# Protokolo de la Komitatkunveno de la 16-a de Oktobro 1996

Ĉeestis : P° Bourdon,F-to Marmou,F-inoj Chaney kaj Michel,s-roj Bessière,Colleu,Despiney,Lafargue,Pons kaj Villeneuve.

La komitato decidis altigi la kotizon,kiu ne ŝanĝiĝis depost 1990. Ekde la 1-a de januaro 1997,la baza kotizo estos 60 F. Por geedza paro 80 F,por bonfaranto 200 F, Por pastroj,religiul(ino)oj kaj infanoj ĝis 16-jara 30 F .

F-to Marmou raportis pri la venonta kongreso en La Houssaye en Brie kaj donis la necesajn informojn,kiujn vi trovos aparte.

En 1998 okazos,fine de julio,ekumena kongreso en Nantes,komune organizita de KELI kaj IKUE. Dum tiu kongreso okazos nia ĝenerala kunveno por la jaro 1998.

La komitato laùdis la aspekton kaj enhavon de la renovigita bulteno kaj esprimis sian dankon al S-ro Basso,nova redaktoro.

S-ro Pons raportis pri siaj klopodoj por eldoni,,kunlabore kun A.E.D.,la libron "Dio parolas al siaj infanoj". En konvena tempo,nia asocio alportos al la afero monhelpon ĝis 15 000 F.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo merkredon,la 22-an de januaro 1997.

**KONGRESO en LA HOUSSAYE EN BRIE**
**(Seine et Marne) 23-27/05/1997**

Kongresejo: Prieuré Saint-Martin
149,Rue Etienne Jodelle
76 La Houssaye en Brie
Tel: 01 64 07 41 25 Fakso : 01074573

PROGRAMO:

Vendredo 23/05 :
- Vespere : interkonatiĝo, babilo

Sabato 24/05 :
- Matene :religia temo: "Encyclique de Paul VI : Le développement des peuples (ed. Centurion) . Bonvolu legi tiun libreton antaŭ la kongreso. Pastro Louis Bourdon, O.P, (nia religia konsilanto) prelegos pri la komentario de tiu encikliko.(Vidu p. 12/13 )
- Posttagmeze : ĝenerala kunveno
  Diservo (dimanĉa liturgio)
- Vespere : distraĵo,videokasedo aŭ lumbildo.

Dimanĉo 25/05 : Tuttaga ekskurso per buso .
-Matene:Euro-Disney-Land (ekstere vizito) belega vidindaĵo.
- posttagmeze: parko kaj kastelo de "Vaux-le-Vicomte", konstruita de "Fouquet",XVII. a jarcento sub reĝado de Ludoviko la XIV.a (interne vizito),instruega vidindaĵo.
- vespere : distraĵo kaj babilo .

Lundo 26/05 :
- Matene : Komitatkunveno, kaj Diservo .
-Posttagmeze:Vizito de Priorejo kaj vilaĝo"La Houssaye"videokasedo kaj lumbildoj pri la vivo de abeloj, komentario de Frato René-Jean Marmou,abelbredisto.



-Vespere : Konkludo de la kongreso ! ...

Mardo 27/05 :
- foriro, post la matenmanĝo .

Horaroj de manĝoj : matene je 8.30, tagmeze : 12.30
vespere je 19.30 .

ALIĜILO al la KONGRESO en LA HOUSSAYE

Aliĝkotizo al la kongreso ..............................60,00 Frs
Kompleta pensiono (de vendredo 23.a de majo vespere ĝis mardo 27-a de majo 97 matene; inkluzive ekskurso per buso kaj enirbiletoj de vizitoj.......................................................1000,00 Frs
----------
Sume : 1060,00 Frs

Bonvolu pagi per p.ĉ.k al :
Association Catholique Française pour l'Espéranto.
CCP ROUEN 2 324 93 N
kaj sendi vian aliĝilon al : Frato René-Jean Marmou
Prieuré Saint-Martin
149,Rue Etienne Jodelle
77610 LA HOUSSAYE-en-Brie
Tel: 01 64 07 41 25
Fakso: 01 64 07 45 73

Notu vian nomon,antaŭnomon,adreson,telefonon.
Ĉiu persono sendas aparte la ĉi-kune metitan aliĝilon aŭ fotokopion .

Dankon ! ...

Temo de la Kongreso : LA PLENA DISVOLVIĜO DE ĈIU HOMO KAJ DE LA TUTA HOMARO

1) Enkonduko

La aktuala ekonomia scienco estas ĝenerale praktikata kun liberalismo,sen moralaj direktivo nek interveno. Oni ĝin kalkulas kiel puran sciencon, kiu sufiĉas al si. Tio estas la tezo ĝenerale sekvita de la disĉiploj de la Majstro J.M. KEYNES, antaùe profesoro en la Universitato de Cambridge, en sia verko: " Ĝenerala teorio de la Laboro, de la Interezo kaj de la Mono ".

Antaù 20 jaroj,alia teoriisto basis sian Ĝeneralan teorion sur la Mono. Li nomiĝis Milton FRIEDMAN.Lia baza intuicio estis, ke la prospero de ekonomio postulas plej eblan liberecon por la entreprenistoj kaj sindetenon de la ŝtato el ekonomia agado. Ne surprizas,ke tia doktrino rapide ricevis grandan sukceson kaj lia aùtoro la Nobel premion de la Paco.

MALFELIĈE la mondlarĝa aplikado de tiuj tro liberalaj doktrinoj larĝe fiaskis kaj la stato de la mondo enhavas pli kaj pli da MILITOJ kaj TROMPEGOJ kaj MALSATEGOJ. Afganistanio,Ruandio,Zairio,Tibeto, ktp ktp. Kaj kiam oni petas la opinion de multaj homoj, " ĉu estas principo de ŝanĝo ? " la ĝenerala respondo estas: " mi ne vidas " .

2) Homa -Kristana serĉo .

Tamen, ĉu ni ne povus trovi respondon en la rimarkinda encikliko de Papo PAULO VI, titolita Populorum Progresio t.e. La disvolviĝo de la popoloj .



Ni utile povos interŝanĝi pri,

-> en la unua parto,la plena DISVOLVIĜO DE ĈIU HOMO

nro 15 : alvoko al la disvolviĝo
nro 27 : la Laboro
nro 35 : la Abc
nro 37 : demografio
nro 40 : kultura promocio

->en la dua parto, la plena DISVOLVIĜO DE LA TUTA HOMARO.

nro 44 : la frateco inter la popoloj
nro 45 : la luktado kontraù la malsatego
nro 58 : preter la liberaleco
nro 73 : la dialogo de la civilizacioj
nro 75 : preĝo kaj agado .

3) Konkludo

NUNTEMPE ĈIU ESPERANTISTO povas pli klare vidi la ĉiutagan valoron de la Universala Lingvo por realigi la multegajn aspektojn de la tuthoma kaj tuthomara vivprogramoj. La Sankta Spirito donu al ni ĉiuj la kuraĝon labori al la disvolviĝo de ĉiu homo kaj de ĉiu homaro ! Ambaù laboroj helpas kaj bezonas la alian !

---



La stelon de la magoj,
Vi ne povas vidi,
Eĉ per la pli potenca teleskopo.
Por ĝin ekvidi,
Vi devas rigardi en vi mem,
Ĉar tiu stelo estas en ĉiu homo.
Se vi sekvas ĝin,vi alvenos,
Kie ankaù la magoj atingis,
Kaj vi trovos Tiun,kiun ili trovis.

## PACO SUR VIA DOMO !

*Eĥo de iu letero ricevita de juna profesorino post sia restado en TAIZE .*

<< Mi loĝas je 200 km de Moskvo. Mi estas profesorino pri danco kaj mi instruas al tri infanaj grupoj. Mi ŝatas mian laboron, kaj la kontaktoj kun infanoj helpas min vidi la mondon trans iliaj rigardoj.

Venante por la unua fojo en Taizé, mi komprenis kiom mi estas embarasata for de mia lando. Ni similas al mutaj infanoj, kiuj havas multe por rakonti sed ne sukcesas.


Tio estas , ke ĉe ni en Rusio ni ankoraù multe timas,tial nia malfido. Eble tiun malfidon, ni heredis de niaj gepatroj. Sed la amo, la bonvolo, la reciproka respekto, la fido, la atento al aliaj, liberigas nin de niaj timoj. En Taizé, mi forgesis timon.

Ĉe mi, la plejmultaj de la homoj estas komplete enfermitaj en siaj personaj problemoj: Kiel nutri sian familion, kiel supervivi ? La senlaboreco, la mizero,la krimeco, la seninteresiĝo, igas la homojn agresemaj.

Malespere, kelkaj enfalas en alkoholaĵojn aù drogojn, aliaj atendas miraklon . Mi vidas la gejunulojn de mia urbo, kiel en marĉo. Kelkaj kontentiĝas de tiu koto, aliaj provas sin eltiriĝi kaj helpas aliajn fari same.

Kiel nia Eklezio ekscios helpi ilin por trovi sencon al ilia vivo ?

( Lettre de Taizé : N.5 Octobre-Novembre 1996
edition française : MB)





## FICHE D'INSCRIPTION / ALIĜILO

**ESPERANTO GRUPO EN LA INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO DE LA TAIZE-KOMUNUMO .
en STUTGARTO -GERMANIO**

Taizé
RENCONTRE EUROPEENNE DE JEUNES
Stuttgart
28 décembre - 1er janvier '96/97

Nomo :
Antaùnomo :
Adreso :
Poŝtkodo,Urbo:
Lando:
Telefono:
Profesio :
Aĝo :
Loĝejo : Esperanto-Grupo ĉe
Paroisse St'Bonifatius Böblingen
Prezo (ĉion inkuzive) por la kvin tagoj averaĝe : 350 FF.

Bonvolu fotokopii kaj sendi al :
Communauté de Taizé- Accueil
F-71250 TAIZE-COMMUNAUTE
Tel: 0385503001 Fakso: 0385503016

informoj en esperanto, ĉe: Reinhard Pfluger
Hermannstr.3
D-60318 FRANKFURT

(Rim: Ĉar la bulteno atingos Vin nur en decembro,se tio interesas Vin, vi povos telefoni al la Redakcio.)

## EN NIA ASOCIO

Novaj anoj 1996 : 5/ S-ro TEXIER (Essone),6 /S-ino VINCENT(L-A), 7/ S-to GIRAULT (Vienne) kaj 8/ S-ro CHEVALLIER (Yvelines)
Bonvenon al la genovuloj .

Donacis monon : S-ro CORNUT (Gard),S-ro ANGEVIN (Sarthe), S-ro TEXIER (Essone),S-ino LE COGUIEC (Morbihan),kaj S-ro GUEGUEN (H-V),
Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.
Bonfaranto 1996 : 6/ S-ino GUILLOT (Oise)

Se vi havas ruĝan glumarkon aŭ ruĝan krucon sur via adreso de via bulteno,vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon 1996.Tiu numero estas la lasta, kiun ni sendas al Vi. Bonvolu do tuj reaboni . Dankon .

## Ni funebras kaj kondolencas .

**Forlasis nin ĉi tiuj niaj gefratoj :**

- **S-ino Suzanne Rossignol , 94-jara**
  iama anino de F.K.E.A, forlasis ĉi-tiun mondon en septembro 1996 en Sées (Orne)
- **S-ino Simone RAVENSTEIN, 65-jara,**
  forpasis en Marseille la 4.an de oktobro 1996 pro kancero.
- **Pastro Lucien COTE**
  en Lyon
- **Pastro Jean OUARNIER**
  en Villequier-Aumont (Aisne).

***Al la familioj, sincerajn kondolencojn. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiuj karaj geamikoj kaj gefratoj en Kristo.***



## LETERKESTO

En oktobro kaj novembro alvenis 16 leteroj. Mi sincere dankas ĉiujn pro viaj gratuloj por la bulteno.Jen du specialaj leteroj.

*" ....Karaj katolikaj esperantistoj en Francio,karaj gefratoj kaj ceteraj legantoj,estas bone,ke la Franca Katolika E-Asocio strebas pri vigligo de la aktivadoj,kies rezultoj jam estas videblaj en belaspekta bulteno. Jes,daŭrigu sur la irata vojo,kiu proksimigos vin al Dio. Nuntempe por ni, katolikaj esperantistoj ekzistas nur unu irebla vojo, kaj tiu estas en plenumado de jena programo: adori Jesuon en Eŭkaristio kaj vivi vere aŭtentikan katolikan kredon pere de Eŭkaristio, kunlabori kun Virgulino Maria je savo de la mondo per sinkonsekro al ŝia Senmakula Koro,konservi fidelecon kaj amon al Petro de nuna tempo - al Papo Johano Paŭlo la Dua. Estu do firmaj kolonoj de la sankta katolika Eklezio,por ke baldaŭ estu venkita la potenco de la diablo en la nuntempa mondo,por ke finfine ekestu en la mondo erao de Sankta Spirito. Plenumante tiun programon,ĉiuj katolikaj esperantistoj proksimiĝu al la sojlo de la tria jarmilo,por ke ni pere de Esperanto plenumu alvokon de la Papo: novan evangelizadon de Eŭropo kaj la mondo. Por iri tiun vojon kaj plenumi tiun programon, mi elpetas por vi Diajn gracojn kaj benojn kaj ŝirmon de la Patrino Virgulino Maria. "*

Miloslav Ŝvaĉek, vicprezidanto de IKUE
kaj prezidanto de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio.

Red: Dankon por la regula sendado de via belega trimonata katolika esperanta bulteno "DIO BENU"

" *Kun tre granda plezuro mi regule ricevas FKE. Tiu bulteno estas por mi,la plej bela, kaj la plej facile legebla.Vere,mi estis surprizita ricevante tiun novan bultenon ... Dank'al Dio mi sukcesis plibonigi mian etan salajron. Multe da senegalanoj multe pensas pri la devaluto de nia franko CFA, kiu mortigas nin ĉiutage. La Monda Banko faris tion por devigi niajn registarojn ŝanĝi sian politikon. Afrikaj ŝtatestroj multe forgesis la afrikajn popolojn. La malsato ĉiam mortigas la homojn en aliaj landoj. Pro tio, ne estas facile por ni afrikanoj aliĝi aŭ aboni je ĵurnaloj aŭ revuoj.*
*ACFE estas tre grava asocio kaj vera malferma asocio al ĉiuj katolikaj esperantistoj kaj eĉ ne-katolikaj E-istoj.Mi tute konsentas fariĝi ano de ACFE, ĉar mi estas eterna kristano.Preskaŭ ĉiuj niaj gelernantoj estas katolikaj. Dakara E.Klubo estas la ĉefa klubo de ĉiuj klubetoj de aliaj regionoj. Estas tre grave krei katolikan Esperanto Asocion, se tio eblos, ni kunvenos en Novembro. Al ĉiuj katolikaj esperantistoj el Francio, bonan akcepton al la Papo J.P II.a, eternan fratecon inter ni, mi deziras.*
*Kore via samreligiano,"* s-ro Alphonse Diatta
DAKAR Senegalio

Red: Kiu volus zorgi pri la rilatoj de ACFE kun Senegalio ?Kiel nia asocio, franca sekcio de IKUE, povus helpi la Senegalanojn.


*Ĉi-apude poŝtmarko sendita el Litovio de Antanas Gvildys*
*(Litova poŝto 1994: 20 Ct )*






# KALENDARO

| | |
|---|---|
| 1996 | |
| 25/12 | LILLE : 14 h Kristnaska Diservo en esperanto en : Couvent des Dominicains 7,Avenue Salomon 59800 LILLE Tel: 20.55.00.82 |
| 28/12 ĝis 01/01 | STUTTGART (Germanio ) Taizé-Renkontiĝo kun Esperanto-Grupo . (Por aliĝi vidu p. ) |
| 1997 | |
| 22/01 | PARIS Komitatkunveno de ACFE en Parizo |
| 23/05 ĝis 27/05 | LA HOUSSAYE-EN-BRIE Kongreso de Franca Katolika Esperanto Asocio. |
| 19/07 ĝis 02/08 | SEBRANICE (Ĉeĥio) 17-a IKUE E-Tendaro |
| 31/08 ĝis 08/09 | ROMO-RIMINI (Italio) 50-a jubilea IKUE-Kongreso Temo: "Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj ". Merkrede 3.9 Aŭdienco ĉe Papo . (aliĝilo en venonta bulteno) |




## ANEKDOTOJ

Geangloj libertempas en Germanio. Promenante tra la kampoj,ili ekvidas ĉarman dometon. Oni diras al ili, ke ĝi apartenas al la Pastro. Vizitante lin, ili konsentas por lui ĝin venontan someron.
Reveninte hejmen,la virino memoras,ke ŝi ne vidis,kie troviĝas la "WC"-on (Water-Closet) . Tuj, ŝi skribas al la Pastro por peti tiun informon.
La germana pastro ne komprenis la mallongigon "W.C" ... Ĉar temis pri angloj, li tuj pensis pri la Anglikana Kapelo, nomita "Wood's Chapel" (kapelo en la arbaro) . Li do respondis :
" Estimata sinjorino, mi ĝuis vian afablan leteron kaj povas vin informi : Tiu loko troviĝas je dekdu kilometroj el la dometo.Kompreneble,ĝenas, se vi kutimas ĝin viziti plurajn fojojn dum la tago.Sed, vi povus kunporti vian tagmanĝon kaj restadi ĝis la vespero. Ekzistas aùtobusoj. La ejo entenas kvarcent sidantajn personojn, cent pliajn povas stari. Je la eniro,ĉiu el vi ricevos paperfolion. Se vi malfruas,eble elĉerpita estos la paperpako. Tiam,vi duonigos kun via plej najbara persono.La infanoj staras kun siaj gepatroj. Ili rajtas,se ili bonvolas,kanti ĥore.
Je la eliro,vi devos redoni la folion,prefere nek difektitan,nek falditan,ĉar ĝi devas utili dum unu monato. Esperante,ke ĉi-tiuj informoj plenkontentigos vin,mi respekte vin kaj familion salutas.

(Ghislaine ZARCA - Nice)



## ANONCOJ



04/ LABOR-GRUPO 1996-97
"Paco kaj Esperanto - Kiel la religioj povus kontribui al la paco . "
Unu sabato po monato de 14h 30 ĝis 16h30
Dato: 14/12 - 11/01/97 - 08/02 - 08/03 - 12/04
10/05 kaj 14/06

Adreso: Couvent des Dominicains
7,Av. Salomon 59800 LILLE
Tel: 0320149696
Trama haltejo : "Saint-Maur"


05/ Se kelkaj el vi ŝatas verki, skribi,traduki , bonvolu noti ke ni povas zorgi <u>senpage</u> por la eldonado de la libro en esperanto , kondiĉe ke temas pri religio . La kandidatoj devus sendi al la redaktoro la projekton en esperanto .
(ekzemple: Vivo de sanktuloj, historio de nia asocio , ....)

**FELIĈAN KRISTNASKON**

kaj

**DIBENATAN NOVJARON**

## KRISTNASKA MENUO



Ĉu vi scias kion ni bezonas
por prepari bonan Kristnaskan manĝon ?
Prenu vian skribilon kaj notu .
Jen la almiksaĵoj:
Malmulte da meleagrino kaj da dolĉaĵo,
Bona mezuro da simpleco kaj multe da kompreno.
Kelkaj gramoj da honto por nia silento antaŭ tiom da maljusteco.
Kaj pinĉopreno da bedaŭro por la kuraĝo kaj aŭdaco kiun ni ne havis .
Kondimentu per bona volo.
Forprenu la pecojn de egoismo kaj de pretendo.
Do restas al Vi, homo malgranda kaj malforta.
Provu trovi kelkajn grajnojn da kredo.
En pakaĵo nova aŭ malnova
Aldonu la florojn de l'amikeco,
kaj lasu ripozi la tuton.
Tio ne estas facila kaj povas preni iom da tempo,
Sed dum Kristnasko,Vi povos oferi homon, kiu vere havas guston kaj firmecon.
La aliaj sin firmiĝos, ili vivos denove.
Kaj se iu vin petas de kiu vi havas tiun recepton,
Diru tutsimple ...
de Jesuo Kristo !



## Libroservo

Prezo en francaj frankoj por membroj de A.C.F.E:
Konto :
Association Catholique Française pour l'Espéranto C.C.P. ROUEN 2 324 93 N

| | |
|---|---|
| Letero de TAIZE 1996 en esperanto (4p.A4) (aŭ poŝtmarko al la Redaktoro ) . | 3 F |
| Faldkarto pri Sankta-Odilia aŭ Kristo | 15 F |
| Roma Meslibro en Esperanto (2 volumoj) | 460 F |
| Franca libro "Archevêque et laveur de vitres " biografio de kardinalo Miroslav VLK | 80 F |
| Vidkasedo : La Mortotuko 55 mn | 220 F |

## Kotiztabelo 1997

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto : S-ro M. COLLEU
95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES
P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

| | |
|---|---|
| A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo | : 60 F |
| geedza paro | : 80 F |
| infano ĝis 16-jara,pastro,religiu(in)o | : 30 F |
| bonfaranto | :200 F |
| U.F.E kun Revue Française" kaj "E° Actualités" | :300 F |
| U.E.A kun "Esperanto" kaj Jarlibro | :310 F |

Dépot légal : 4ème trimestre 1996 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE
Directeur délégué: Michel BASSO

# ALIĜILO al la KONGRESO en LA HOUSSAYE

Aliĝkotizo al la kongreso .............................60,00 Frs
Kompleta pensiono (de vendredo 23.a de majo vespere ĝis mardo 27-a de majo 97 matene; inkluzive ekskurso per buso kaj enirbiletoj de vizitoj...........................................................1000,00 Frs

----------

Sume : 1060,00 Frs

Bonvolu pagi per p.ĉ.k al :
Association Catholique Française pour l'Espéranto.
CCP ROUEN 2 324 93 N
kaj sendi vian aliĝilon al : Frato René-Jean Marmou
Prieuré Saint-Martin
149,Rue Etienne Jodelle
77610 LA HOUSSAYE-en-Brie
Tel: 01 64 07 41 25
Fakso: 01 64 07 45 73

Nomo : ..................................................
Antaùnomo: ............................................
Adreso : ..................................................
..................................................
Telefono: ...............................................
Mi venas per (aùto, trajno, .... ) ...................

Dato : ................ Subskribo: ..................